Anuliina Savolainen
UNESKO

# Douglas Rushkoff:
## "Legi estas ankoraŭ unika sperto por infanoj"

"La sperto legi rakonton estas tre malsama, se oni estas mergita en libro aŭ trarulumas tekston sur ekrano," diras Douglas Rushkoff, usona amaskomunika teoriisto kaj iniciatinto de konceptoj kiel "virus-medio" kaj "ekran-junulo".

***Vi kreis la terminon "ekran-junulo" en via libro* Ludi la futuron: Kion ni povas lerni de ciferecaj infanoj en 1996. *Kiel la ekranoj fasonis novajn generaciojn?***

Preskaŭ ĉiuj, kiuj legas ĉi tion, estas ia speco de ekran-junulo. Kiam mi estis infano, la televidilo kun katodradia tubo estis kiel tria gepatro en Usono, ĉar la plimulto de niaj gepatroj laboris aŭ estis okupataj. Vi venis hejmen kaj sidis antaŭ ĉi tiu "vitra panjo" kaj tiel ricevis vian nutraĵon. Sed kiam mi kreis la terminon, mi celis homojn, kiuj estis edukitaj en la interaga medio: homojn por kiuj tajpi aŭ movi aĵojn sur la ekrano estis normale.

Por mi la kulmino de la "ekran-junulo" estis kiam mi eniris vendejon de aparatoj en la mezo de la jaroj 2000-aj kun ĉiuj tiuj televidiloj kun grandaj ekranoj kaj vidis tri-kvar jaraĝan infanon aliri al la ekrano kaj provi froti fingron sur ĝin.

***Kvankam nuntempe la ekranoj estas parto de la vivo de infanoj ekde tre juna aĝo, tamen la junula literaturo spertas senprecedencan furoron. Kiel vi klarigas tion?***

Ĉi tio estas pozitiva signo. Legi librojn kreas alternativan cerbo-spacon; estas malsama sperto por multaj infanoj, ili eĉ spiras malsame dum legado. Laŭ la kanada teoriisto pri komunikado Marshall McLuhan, interagaj medioj ne kreas la saman sperton de enmergiĝo kiel libro. La libro estas varma medio, kiu liveras riĉajn informojn, kiuj ne postulas respondon; dum interaga medio estas malvarma medio en la senco, ke la mesaĝo ne estas kompleta kaj povas esti kompletigita de la leganto.

En Usono, ni havas preskaŭ neniajn publikajn spacojn por junuloj. La librovendejoj fariĝis lokoj, kie la infanoj povas ludi kaj distriĝi per libroj kiel ludiloj. La homoj de la libroindustrio estas lertaj pri merkatiko: de tuŝaj kaj palpeblaj libroj al ilustritaj romanoj; de mangaoj al Barbie-libroj... estas io por ĉiu emo kaj aĝo.

La cifereca teknologio ne superis la libron. Libro daŭre havas aŭtoron, kaj vi volas cedi vian aŭtonomion al ties aŭtoritato, por ke ĝi faru rakonton al vi. Ĉi tiu rakonta formo postulas linearecon. Kun skribita libro vi ankoraŭ estas en la lando de Aristotelo, kie vi havas rolon farantan elektojn kaj la leganto nerekte spertas ilin kiel neeviteblajn. Ĉio temas pri renverso kaj rekono.

Mi asertus, ke ĉiu amaskomunika medio donas okazojn por nutrado kaj pozitiva disvolvo, se vi uzas ĝin en taŭga loko je taŭga momento. Tio postulas kompreni la inklinojn de ĉiu medio. La libroj estas superaj por lineara rakontado. Interagaj medioj estas superaj por helpi homojn disvolvi potencon kaj konsideri

*La biblioteko de Bezons en la ĉirkaŭaĵo de Parizo, Francio.*



© Gilles Larvor / Agence VU


novajn vojojn. Sociaj retoj estas superaj, kiam uzataj en limigitaj kuntekstoj, por krei komunumojn.

***Multaj adoleskantoj konsultas librojn unue informitinte pri ili ĉe sociaj retejoj aŭ per serio da programeroj. Kiu estas la aldonvaloro, kiun libro ankoraŭ povas alporti?***

Oni bezonas ses horojn por legi unuhoran epizodon de la serio *Ludo de tronoj* en libro. Do, kial ili ankoraŭ ekprenas la libron? Estas interese, ke ili faras tion – ĉi-kaze la libro povas esti konsiderata kiel eniro al fanfikcio (amatora verkado ene de rondoj de fanoj surbaze de ekzistanta verko). La libro funkcias kiel etendiĝo al la serio, ĝi estas ilo por akiri aliajn perceptojn de la rakonto kaj de la roloj.

Fanfikcio havas por mi iom el la origina promeso de interaga kreivo. Kelkaj el la nuntempe plej bonaj furorlibroj unue komencis surrete kiel fanfikcio kaj la romanoj pri Harry Potter de J. K. Rowling inspiris sennombrajn fanfikciajn verkojn. Ĉi tiuj estas interagaj universoj. En la mondo de fantazia rolludado, la libroj pri Ublietoj kaj Drakoj ligitaj al la ludo estas alia ekzemplo de tiu fenomeno.

> “Ĉiu amaskomunika medio proponas okazojn por nutrado kaj pozitiva disvolvo se vi uzas ĝin en taŭga loko je taŭga momento





***Ĉu vi vidas diferencon inter legi fizikan libron kaj legi ĝin surekrane?***

Jes, kaj mi pensas, ke ankaŭ la infanoj konscias pri tio. Libroj estas parto de nia tridimensia orientado. Infanoj, kiuj iras al la librovendejo, marŝas al specifa angulo de la vendejo por vidi kaj tuŝi la librojn, kiujn ili memoras. Tio estas tre malsama sperto ol nur rulumi kaj esti nutrata per algoritmo.

Vi povas kompari tion kun havado de vinila disko kontraŭ uzado de muzikelsendflua servo. Kiam vi alvenas al la fino de la unua flanko de la albumo, vi inversigos ĝin por iri al la komenco de la dua. Sammaniere, vi estas space orientita kun libro. Vi memoras aferojn malsame.

Multaj homoj ankaŭ aŭskultas librojn, kio por mi ŝajnas pli taŭga uzado de cifereca teknologio ol legi ilin sur ekrano. Aŭdlibro povas krei pli da enmergiĝo: vi fermas viajn okulojn kaj sentas kvazaŭ vi povus esti tie.



Uzanto-interfaco kaj dezajnistoj de uzanto-sperto pliboniĝas por krei senton de spaco en enretaj spertoj. La “metaverso” supozeble estus bona por tio: loko kie homoj faras mondan kreadon, kaj anstataŭ nur krei senfinan tunelon, ili kreus lokon, najbarejon.

***Ĉu la gepatroj devus maltrankviliĝi pri la influo de ekranoj sur siaj infanoj?***

La gepatroj ĉiam devus maltrankviliĝi pri la uzado de io ajn. Ili devus maltrankviliĝi kiam ili permesas al sociretejaj kompanioj

> “Legi fizikan libron estas tre malsama sperto ol nur rulumi

havi ok horojn de la konscia tempo de iliaj gefiloj. Kiam ni vidas, ke junuloj estas deprimitaj kaj anksiaj kaj ke spite tion la grandaj teknologiaj kompanioj daŭre funkciigas siajn kompaniojn laŭ metodoj, kiuj antaŭenigas tiujn sentojn kaj kondiĉojn, tio maltrankviligas.

Mi opinias, ke ni devus pensi pri ĉiu nova medio, kiun vi alportas en ilian vivon, sammaniere kiel vi pensus pri tio alporti novan beston hejmen. Temas pri la kompreno de tio, al kio vi kuraĝigas, kiam vi donas novan ilon al la infano, kaj kiel vi partneras kun la junulo per tiu medio. Ne temas pri la ekranoj mem, sed pri tio kiu stiras kaj kio estas sugestita al infanoj per la inklinoj de la platformo. ■

***-El la angla esperantigis Trefflé Mercier (Kanado)***